

# BELGA ★ ESPERANTISTO

Monata  
Revuo  
fondita  
en 1908a

DIREKTORO:

Maur. JAUMOTTE

44, Avenue De Bruyn  
Wilryck-Antverpeno

Oficiala Organo de

Reĝa Belga Ligo Esperantista



Societo sen profita celo. --- Belga Ŝtatgazeto 27.0.30

KOMENCO KAJ FINO

## Nia Universala Kongreso estas for

Kiam mi skribas tiujn liniojn, la Universala Kongreso, kiu okazis, tiun ĉi jaron, en Londono estas mortanta.

Jam mi ricevis de nia Ligo Prezidanto, unuajn notojn, kiuj permesos doni al niaj legantoj, impreson pri la malferma kunsido, kaj aliaj notoj estas promesataj, kiuj, ni esperu, ankoraŭ alvenos ĝustatempe, por esti enpresataj en tiu ĉi numero.

Nia jarfesto estis efektive granda festo, ĉar partoprenis ĝin pli ol 1600 partoprenantoj kaj ĉar, por la unua fojo en la lastaj jaroj, ĝi povis vivi sian mallongan vivon, sen diskutoj pri la organiza problemo, kiel tion substrekis unu el la paroladintoj de la malferma kunsido.

La Jarfesto, — la universala Kongreso de la neŭtrala Esperantistaro —, okazas ĉiam en Aŭgusto kaj, tiel lokita, ĝi havas duoblan signifon.

Ĝi signifas por ĉiuj la pioniroj kaj batalantoj sur la Esperanto-kampo, ke finiĝis denove periodo de grava, senlaca laboro.

Ĝi donas al ili la rajton, vivi, dum kelkaj tagoj, tiujn feliĉajn tagojn, dum kiuj ili vere ĝuas tiun edenan ĝojon, pleneaktivigi, dum unu semajno, la celon, kiun oni postkuris dum tuta jaro.

La Universala Kongreso por ili estas, kiel la ĉiela rekompenco de ilia laboro.

Dum unu jaro, ili alvokis la homojn al frata interkompreniĝo.

Dum unu semajno, ili dronas en tiu atmosfero, en kiu unu lingvo permesas al individuoj, venintaj el ĉiuj partoj de la tero, interparoli kaj babili.

Sed se, tiel konsiderata, la Universala Kongreso estas kvazaŭ celo, kvazaŭ fino, ĝi tamen ne povas esti nur tia.

La Ĉielo estas senfina. La ĉiela impresio, kiun havas la feliĉa Esperantisto dum la Universala Kongreso tamen ne povas esti senfina.

Se ne, baldaŭ ekaperus la rezultato diabla, ke la homoj malinteresiĝus; ke la progreso iĝus malprogreso; la antaŭenirado retro-irado kaj la ĉiela impresio, nur sarkasmo kaj malĝojo.

La Universala Kongreso estas ankaŭ la okazo por ĉerpi novajn fortojn por la posta laboro; la laboro, kiu ŝajnas ankoraŭ fora, ĉar la oficiala

libertempo ankoraŭ plene daŭras; sed kiu tamen estas jam tiel proksima, ĉar ĝi devas esti zorge preparata dum la libertempo, se ĝi volas esti efektivebla tuj post la ferio, ĉe la malfermo de la lernejoj.

Tiuj, kiuj iris al la Universala Kongreso, verŝajne promesis unu al la alia, fari, ĉiu en sia respektiva lando, la necesan laboron.

Sed multaj ne povis ĉeesti la Kongreson kaj, dise, nun pasigas agrablajn tagojn, ekster la Esperanta atmosfero.

Kaj por ili ankaŭ, la tagoj rapide forpasas.

Tiel rapide ke baldaŭ ili, kun konsterniĝo, konstatos ke la libertempa periodo jam rapide forflugas.

Eble ili ne tiel akurate pensas pri la laboro farota.

Kaj la celo de tiu ĉi somera artikolo, — kiun mi skribas dum la termometro en mia laborĉambro montras 32 gradojn —, estas nur — konvinki min mem pri la utileco de mia nuna laboro kaj atentigi ĉiujn miajn legantojn pri tiu fakto.

Ni scias, ke revu-numeroj dum la ferioj havas, tre ofte, malbonan akcepton; ke ili facile perdiĝas meze de la amaso de papero, kiun la hejme restantaj familianoj aŭ servistoj trovas, ĉiutage en la leterkesto, kaj tamen mi esperas, ke pensante, ke temas pri gaja rakontado pri nia Universala, kelkaj el niaj kutimaj legantoj, estos komencintaj la legadon kaj nun, pro memrespekto, daŭrigos ĝin legi, malgraŭ la varmeco kiu, certe, regos en ilia ĉambro, ankaŭ je la momento, kiam ili ricevos tiun ĉi numeron.

Kaj pri iliaj ĉies esperantaj sentoj, mi estas sufiĉe certa, por havi la konvinkon, ke, legitaj miaj vortoj, tre certe, pripensigos ilin ĝustatempe pri ĉio farota.

Kaj tiel ni povos plenfide komenci nian propagandon por la venonta sezono kaj esperi rikolton ĉiam pli belan.

Maur. JAUMOTTE.

La numero de Oktobro aperos la 23-an de Septembro kaj tiu de Novembro la 1-an de tiu monato.







# La "MINIPIANO" BRASTED


PREZENTATA  
DE

**GUSTAVE FAES**

Schoenmarkt, 16<sup>1</sup>  
Marché aux Souliers  
ANTVERPENO

KOSTAS

Fr. 4.400,—



Gustumu la bonegan

**YOUGHOURT "NUTRICIA"**

- ĉiam freŝan. -

Produktoj por ĉiuj dietoj, por plenkreskuloj kaj infanoj. Generala Deponejo:

Sta Jakob-strato 8, BRUGO.

**CREMERIE DE DIXMUDE**

F-ino M. M. MESTDAGH  
St. Jacobstr., 8, rue St. Jacques  
BRUGO.

Specialaĵoj: Butero de Dixmude, Tel.:  
Ovoj, Fromaĝoj 318 52

OSTENDO BELGUJO

**HOTEL VROOME**

RENDEVUO DE LA ESPERANTISTOJ  
20, BULVARDO ROGIER. — Tel.: 37.

**BELGA MARBORDO**

**Grand Hôtel d'Oostduinkerke**

Bone konata de multaj Esperantistoj.

**P. BENOIT, Delegito de U. E. A. Posedanto**

**HOTEL DU CORNET D'OR**

2, PLACE SIMON STEVIN (BRUGO)

Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista (Reĝa Societo).  
— Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝaĵoj. —  
Oni parolas Esperanton. — English spoken. DS (106).

**"GEVEA" SAPO...**

bonega sapo...

do: VIA sapo!

mendu ĉe:

**G. VERMANDERE**

Wetstraat, 15, Antverpeno

**ESTRARO DE „BELGA LIGO ESPERANTISTA“**

Prezidanto: D-ro Paul Kempeneers, 19, Avenue Montjoie,  
Uccle. (Tel.: 44.53.00.)

Vicprezidantino: F-ino Yvonne Thooris, 4, Wijnzakstraat —  
Rue de l'Outre, Bruĝo. (Tel.: 320.86.)

Vicprezidanto: S-ro Maurice Jaumotte, 44, Avenue De  
Bruyn, Wilryck (Antverpeno). (Tel.: 777.58.)

Sekretario: S-ro Ch. Poupeye, 42, Elf Julistraat, Bruĝo.

Kasisto: S-ro André Tassin, 1, rue St Joseph, La Louvière.

Por pagoj de kotizoj, anoncoj, abonoj kaj donacoj:  
P.C.K. 1337.67 de Belga Ligo Esperantista  
(La Louvière).

Por pagoj al I. E. L.:

grupanoj al la P.C.K. de sia grupo;  
izoluloj al la P.C.K. de Belga Ligo

Por ĉiuj aliaj rilatoj pri I.E.L. sin turni al:  
S-ro G. Van den Bossche, teritoria sekretario.  
Rembrandtstr., 7, Antverpeno.

Por pagoj al Belga Esperanto-Instituto:

P.C.K. 1689.58, Antverpeno (Lange Leem-  
straat, 127).